# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

6a jarkolekto, n-ro 9
decembro 1986

ATENTINDAĴOJ

10 01 1987 : ESTRARKUNSIDO

24 01 1987 : KADROKURSO PRI PAROLTEKNIKOJ.

JE 11 12 1986 NASKIĜIS ĈE PAUL KAJ TREES PAEERAERTS-DOOMS FILO, NOMITA STIJN.

AL LA GEPATROJ KAJ FRATINO NI ELKORE GRATULAS KAJ AL LA NOVNASKITO NI DEZIRAS SANON, PROSPERON KAJ ĈION NECESAN POR FELIĈA VIVO.



LA PREZIDANTO KAJ ESTRARANOJ DE FEL DEZIRAS AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ FAMILIANOJ AGRABLAJN JARFINAJN FESTOTAGOJN KAJ FELIĈAN NOVJARON.



**Informilo,** kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Meidoorn 42, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto) 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Meidoorn 42/2, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 9?
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN

Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO
Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVE[illegible]

Albert CLAESEN 011/32 36 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO
Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 13-a de decembro 1986 en Antverpeno.

Ĉeestis : Ivo Durwael (ID), Gerd Jacques (GJ), Roland Rotsaert (RR) kaj Jan Bovendeerd (JB).

Petis senkulpigon : Paul Peeraerts, Edward Symoens, Erik D'Hondt kaj Hilde Vaningelgem-Vandriessche.

Prezidis : ID

Protokolis : JB

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 15 11 1986 estas aprobita.

2. Manlibro
Marc Van den Bempt sendis faskon da folioj aldonotaj al la manlibro. Inter ili troviĝas la Regularo pri Interna Ordo.
Post priekzameno kaj korektado de la teksto, la fasko estos resendita al Marc por adaptado, multobligado kaj dissendado.

3. Peranto de UEA en Belgio.
Kiel sciate, en la ĝenerala jarkunsido de BEF je 18 11 1986 ne estas trovita akordiĝo rilate al la peranto de UEA. Ja kandidatiĝis, krom nia propra Esperanto-centro, S-ro Roger De Schepper.
Nun ni ricevis kopion de letero de S-ro Demonty, prezidanto de BEF kaj de S-ino L. Dreze, prezidanto de APE.
En sia letero, S-ro Demonty petas al ambaŭ kandidatoj surpaperigi siajn argumentojn surbaze de kiuj estu decidota.
Post pridiskutado, decidiĝas sendi leteron, en kiu ni detale eksplikas niajn sintenon kaj argumentojn kun kondiĉoj .Nome, por konservi la pacon, FEL-estraro opinias povi cedi, sed kun la nepra kondiĉo ke niaj informoj ne estu mis-uzataj.

4. Jubilea Jaro.
Vidu apartan artikolon.

5. Gazetara Konferenco.
Komence de januaro 1987 okazos en Antverpeno gazetara konferenco.
ID opinias ke necesas povi disponi pri artikolo aŭ almenaŭ teksto pri la historio de Esperanto.
JB klopodos verki tiun tekston surbaze de "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO" kaj la kursoteksto de niaj kadrokursoj (F. Roose).

6. Buskaravano al la UK en Varsovio

Ĝis nun sin anoncis 30-o da kunvojagontoj.
Pliaj informoj sekvos poste.

7. FEL-AFIŜO - SLOGANOJ

Por sia propagandafiŝo, kiu antaŭ longe aperos, FEL bezonas taŭgan sloganon. Rilate al tio, JB revenas al ideo de antaŭ kelkaj jaroj, nome organizi konkurson pri sloganoj en la nacia lingvo. Do, nun, en la nederlanda. Fakte ni atendis okazon por tia konkurso, kaj jen ĝi.

Ni bezonas fakte taŭgan, celtrafan, atentokaptan sloganon, uzeblan sur reklamafiŝo aŭ alia reklam- aŭ propagandmaterialo.

Pri la premio ni devos ankoraŭ decidi, post interkonsento kun nia financkomisiono. La RR la premio devas esti alloga.

Tamen, tiuj kiuj interesiĝas pri la konkurso, povas jam ensendi la rezulton de sian penoj al ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN, je la atento de Ivo Durwael.

8. Financoj - Administrado (GJ)

Antaŭ kelke da tempo FEL sin prezentis kiel SERVO-SOCIETO en rilato kun ĉio kio koncernas Esperanton. Do, ankaŭ por aboni revuojn ktp.

Nun evidentiĝas ke temas pri tempo- kaj mono-raba entrepreno kaj nia financa- kaj administra komisiono sin demandas ĉu estas ankoraŭ interese daŭrigi. La problemo ne koncernas tiujn revuojn por kiuj estas sufiĉe da abonoj, jes tamen tiujn, al kiuj nur unu aŭ kelkaj abonas. Ankaŭ la transpago de la abonkosto ne estas grava, sed la posta administrado, kiel ekz. reklamacii en kazo de ne (ĝustatempa) ricevo k.s.

La afero estas pripensata kaj se necese antaŭmetota al la ĝenerala kunsido en marto.

9. Diversaĵoj

Al nia petletero pri partopreno en la jubilea Patrona Komitato respondis - ĉiuj favore ! - ĝis nun : 4 ministroj, 2 guberniestroj, 2 urbestroj, 3 partiprezidantoj, 2 universitataj rektoroj kaj la Ĝenerala Direktoro de la Nacia Sekretariato de la Katolika Instruado.

Konpleta listo aperos en nia januara numero de INFORMILO.

Fina horo : 13.00 h.

-------

La planita posttagmeza studotago por sekretarioj kaj kasistoj ne povis okazi pro neantaŭviditaj cirkonstancoj.



Koncizа raporto pri la kunveno por aktivuloj pri GAZETARA SERVO, je sabato 06 12 1986, laŭ propono de Germain Pirlot.

---

Ĉeestis : Germain Pirlot, Eddy Van den Bosch, Jan Hanssen, Lucien De Sutter, Peter Ebenau, Annie k. Herman Deceuninck, Luc Rijnders, Ivo Durwael Jos Van den Bergh.

Jam laboras aŭ pretas labori por GS, sed ne povis ĉeesti : Albert Claesen, Jef Geeraerts, Fernand Roose, Jan Bovendeerd.

Komenca horo : 14.00

Post diskutado, la ĉeestintoj decidis, dum almenaŭ unu jaro, eksperimente labori laŭ jena strukturo.

1. Gazetara Servo : kolekti novaĵojn kaj dissendi al la gazetaro oficialajn komunikojn nome de FEL.
   Gvidas Annie kaj Herman Deceuninck.
2. Kunordigo de kunlaborantoj : sub gvidado de Germain Pirlot la kunlaborantoj povas :
   - aktivi per regula sendado de informoj aŭ reagoj (leteroj de legantoj)
   - aktivi malofte, hazarde, laŭ personaj eblecoj (eks. studento)
   - ensendi eltondaĵojn.

   Ĉiu kunlaboranto ricevos demandoliston sur kiu li/ŝi mem povas difini siajn eblecojn.

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

Ekde nun la supre menciitaj kunlaborantoj sendu ĉiujn eltondaĵojn rekte al Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 35 b.3, 8400 OOSTENDE, tel. 059/70 87 00

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

Eltondante aŭtomate aldonu TITOLON, APERDATON, ADRESON. Ankaŭ la adreso gravegas, ĉar multaj eltondaĵoj aperas sur lokaj paĝoj.

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

Por ne konfuzigi la abonantojn de ESPERANTO PANORAMA kaj ĉar la unua jaro estas eksperimenta, ni NE faros ĝeneralan alvokon por sendi eltondaĵojn al GP. La ne-kunlaborantoj daŭre sendadu la materialon al la ESPERANTO-CENTRO.

GP fotokopios ĉion kaj dissendos al la kunlaborantoj laŭ ilia indiko pri interesiĝo sur la menciita demandolisto. La E°-Centro ricevos kopion de ĉio.
Li sendos koverton minimume unu fojon en la monato kaj aldonos laŭbezone konsilojn. La kopioj servas por havigi pliajn informojn kaj inspiron al la aliaj.
La ĉeestintoj permesis liberan kopiadon aŭ tradukadon de alies artikolo eventuale sub alia nomo.

Se rapida reago estas necesa, oni interkontaktos telefone.

GP donis al la ĉeestintoj serion da interesaj konsiloj kun konkretaj ekzemploj. La resumon oni povas legi en la broŝuro "Kiel rilati kun la gazetaro", kiun ĉiu kunlaboranto ricevis aŭ ricevos. Bv. nepre legi ĝin.

3. ESPERANTO PANORAMA

Paul Peeraerts ricevos ĉiujn fotokopiojn de gazeteltondaĵoj. Li povos uzi ilin kune kun aliaj sendaĵoj por la rubriko "Uitgeperst" kaj faros liston de aperintaj artikoloj.

La protokolinto petos al Paul ankaŭ atenti pri tiuj fotokopioj je la elekto de libropremio.

Protokolis Ivo Durwael.

---

INFORMA AGADO POR LA JUBILEA JARO.

Ĉu sube sekvos "konfidenca" raporteto pri kelkaj faritaj / farotaj kontaktoj por altiri la atenton de la komunikiloj. Tio signifas, ke ni mencias eblecojn kiuj parte devas ankoraŭ esti konfirmitaj. Do, bonvolu ne fanfaroni pri tio al la ekstera mondo. Ni nur mencias ilin por veki vian entuziasmon kaj por klarigi ke ni bezonos multajn kunlaborantojn kaj konsilantojn.

Ĉe BRT S-ro Jacobs promesis 1 elsendon de "HET VERMOEDEN" (90 min.)
Ĉe BRT 3, S-ro L. Wijnants promesis serion da elsendoj.
La sama okazis en "Uit de Band" (Nora Nijs), "Imago" (Els Loos), "Schooluitzendingen" (W. Ganzemans), "Studio Brussel" (Jan Schoukens).
Symoens havis jam kontakton kun Jan Bauwens (Dienst Wetenschappen).

" Werelduitzendingen" (Gil Claes) proponis intervjuon por "De Muziekmixer".
En la oficistara gazeto de BRT aperos artikoloj kaj informoj.
Ĉion tion ni dankas al vigla esperantisto Louis Janssens ĉe BRT. Li nun klopodas entuziasmigi homojn de la televizio por organizi programon en decembro '87.
Krome ekzistas eblecoj ĉe BRT Antwerpen en "Mediatrijs" (Fred Claes) kaj ĉe BRT limbrug (Rita Jaenen) en "Parkeerschijf".
Supozeble je la 14-a de januaro okazos en la Esperantocentro gazetara konferenco por enkonduki la jaron. Dume kaj poste ni povos starigi kontaktojn por verki apartajn artikolojn i.a. ĉe KNACK (Johan de Roey), REFLECTOR (Rik d'Hondt) TOP (Catherine Seynaeve), GAZET VAN ANTWERPEN (Jos Vranckx, Johan Staes), DE STANDAARD (Gaston Durnez, Hnery Snoek)
Ni krome provos ĉe ARGUS en la TV. André Staes jam faris kontakton kun la prezidanto de UNESKO-Komisiono pri prezentado de la teatraĵo "Kia Miksaĵo".
Tiu kontakto ankaŭ ebliĝos kun la TV respondeculo pri teatro.



"Bond zonder Naam" volas emfazi la rolon de Esperanto por internaciaj kontaktoj dum lernejaj prelegoj. En ĝia revuo de aprilo aperos paĝo por emfazi la rolon de ĝia Esperanto-filo "Movado sen Nomo".

Eĉ se nur ono de tiuj planoj efektiviĝo, la Jubilea Jaro certe ne pasos nerimarkite.

Ivo Durwael.

INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL - IX

Ĉ U   V I   E S T A S   E N   O R D O   ?

---

En la rilatoj inter 2 homoj (aŭ transakcioj), ni povas distingi kvar eblajn poziciojn. Mi uzos la mallongigon EO por "en ordo" (= O.K.).

| | |
|---|---|
| 1) Mi NE estas EO | - vi estas EO |
| 2) Mi estas EO | - vi NE estas EO |
| 3) Mi NE estas EO | - vi NE estas EO |
| 4) Mi estas EO | - vi estas EO |

Ĉiu ajn homo ofte ŝanĝas sian pozicion. Sed ni tamen havas preferatan pozicion, kiu plej ofte manifestiĝas. Mi ilustras per kelkaj ekzemploj :

Pozicio 1 : " S-ro instruisto, mi timas vian ekzamenon "
"Mi ne kuraĝas paroli ĉi tie"
"Vi akompanu min al la kongreso. Mi ne kuraĝas iri sola".

Tiu sinteno fontas el (bonintenca) malkuraĝigo de la gepatroj, kiuj tro zorgeme okupiĝas pri infanoj kaj ne sufiĉe permesas al ili kreski al memstareco.

Pozicio 2 : " Se mi estus prezidanto de UEA, ho ... "
" Donu tiun traduklaboron al mi, ĉar ... "
" Li fuŝas la kurson, ĉar laŭ mi, li devus ... "

Tiun sintenon kreiĝas pro gepatroj, kiuj tro ofte prenas la kulpon de infanaj agoj sur sin :
" S-ro instruisto, tion mia infano certe ne faris !"
" Mia infano ne estas sanktulo, sed se oni ankoraŭ batas lin, mi intervenos !"
Finfine estiĝas la impreso, ke la kulpo de ĉiuj malbonaĵoj troviĝas ĉe aliaj homoj.

Pozicio 3) estas la sinteno de droguloj kaj drinkuloj.
" Mi nenion bonan povas fari."
" La tuta mondo estas kontraŭ mi."
" Mi ne plu emas vivi."

Tiu sinteno estas la sekvo de gepatra (aŭ edukista) ignorado aŭ malrespektado. Se gepatroj tute ne atentas pri siaj infanoj aŭ nur krias kaj insultas, la infanoj ja ekhavas profundan senton pri malsukceso. Sed finfine, pro la kruelεco de sia situacio, ili ankaŭ juĝas siajn gepatrojn malsukcesaj kaj finfine

la tutan mondon.

Pozicio 4) signifas akcepti sin mem kaj la aliajn, kun siaj ecoj kaj limigoj. Tio estas la situacio de homoj, kiuj vivas en paco kun la tuta mondo. Ĝi helpas nin kaj niajn proksimulojn al plena disvolviĝo de niaj kapabloj. Tiu situacio estas malofta kaj travidebla nur en limigita periodo : homo povas foje senti sin EO en la familio kaj tute malfeliĉa en la dejoro ktp. Strebo al pozicio 4) povus esti la plej bela taskodifino por Esperanto-klubo.

Eble vekiĝas ĉe vi la rimarko, ke ni jam havas nian fiksitan favoran pozicion de la infanaĝo. Tio ne igu nun fatalismemaj : la pozocio estas fiksita, sed konsciiĝo donas la eblecon por ŝanĝi ĝin. Ju pli klare ni konsciiĝas pri nia propra vivstilo, des pli facile ni povas aliigi ĝin.

Ivo Durwael.

## Membrostatistiko 1985 - 1986

| Grupo | en 1985 | en 1986 | |
|---|---|---|---|
| Aalst | 41 | 43 | 2 |
| Brussel | 22 | 35 | 13 |
| Blankenberge | 7 | 5 | 2- |
| Brugge (Reĝa) | 26 | 11 | 15- |
| Leuven | 55 | 60 | 5 |
| Kalmthout | 32 | 38 | 5 |
| Gent | 19 | 36 | 17 |
| Kortrijk | 32 | 39 | 7 |
| Limburg | 47 | 47 | 0 |
| Antwerpen | 139 | 140 | 1 |
| Mechelen | 7 | 17 | 10 |
| Mortsel | 22 | 20 | 2- |
| Brugge (PJ) | 35 | 41 | 6 |
| Sint-Niklaas | 3 | 3 | 0 |
| Wilrijk | 3 | 3 | 0 |
| FEL | 97 | 121 | |
| Entute: | 593 | 656 | |